

LA ORGANIZAĴO MAZINGIRA P.O KESTO 51, BUNDA. TANZANIO



Retadreso: smbmramba@yahoo.com , Tel: +255 755 076596
Retpaĝoj: www.kono.be/mazingira/eo , www.mazingira.nl , www.verduloj.org/mazingira.htm

22-an de Oktobro 2018

Estimataj subtenantoj de Mazingira .

Jen la raporto pri la laboroj faritaj de Mazingira dum la periodo de Oktobro 2017 ĝis Septembro 2018.

Dum la periodo pluvis sufiĉe en mia regiono, la plantoj en la kampoj bone kreskis , la rikoltoj estis bonaj, neniuj suferis pro manko da nutraĵoj.

Koran dankon al ĉiuj kiuj subtenis la projektojn de Mazingira dum tiu periodo, inter ili:

La franca asocio Solidareco Afriko-Azio de Boris Bouchez, Maryvonne kaj Bruno Robinau, Bart Demeyere, D-ro Manfred Westermayer, Ivo Durwael, Snorre Benum, Christiane Lamy, Simone Kiry, Martin Markarian, la Nederlanda fonduso www.mazingira.nl kaj aliaj. Mi esperas ke vi daurigos vian subtenon al Mazingira ankau por la venonta jaro.

LA RAPORTO 2018

Orfo-projekto;

ĉirkaŭ 468 infanoj ricevis helpon de Mazingira en 2018 ,inter ili ĉirkaŭ 432 infanoj ricevis helpon de Francio pere de la Franca asocio Solidareco Afrika-Azio de Boris Bouchez kaj Maryvonne Robienau kaj 36 orfoj ricevis helpon de Belgio, Germanio, Nederlando kaj Norvegio. Mi kore petas vin daurigi vian subtenon denove por la jaro 2019 .

Lernejo projekto;

La konstruado de klasĉambroj en Sarawe baz-lernejo (kiu estis detruita pro uragano) bonorde dauris en 2018, dank al la subteno de la Franca Asocio Solidareco Afrika-Azio de Boris Bouchez kaj de Wasserkraft Volk AG (instigita de Manfred/AVE), ni sukcesis konstrui 2 klasĉambrojn, unu klasĉambro estis fin-konstruita per la subteno de la Franca Asocio Solidareco Afrika-Azio, kaj la dua klasĉambro per la subteno de diversaj subtenantoj kiun ankoraŭ ne finiĝis, ankoraŭ mankas monon por la tegmento, fenestroj kaj pordon.

Bonorde daŭris la konstruado de knabina Internulejo por 24 knabinoj ĉe Esperanto mez-lernejo pere de la subteno de Manfred Westermayer kaj Simone Kiry, tamen ankoraŭ mankas mono por pordoj kaj litoj.

Tre bone daŭras la konstruado de manĝejo kun kuirejo por 320 gelernantoj pere de la subteno de la Nederlanda fonduso Stichting Mazingira.

En la venonta jaro 2019 espereble la Esperanto mez-lernejo havos pli ol 500 gelernantojn do okazos grandan manko de klas-ĉambroj ĉar ĝis nun ekzistas nur 7 klas-ĉambroj pro tio mi daŭre petas vin daurigi vian helpon por tio kaj por konstruadoj de pliaj instruistaj loĝejoj, bibliotekon, necesejoj kaj komputilejo.

Puto projekto;

Multan dankon al la Franca asocio Solidareco Afriko Azio de Boris Bouchez kiu daurigas la subtenon en 2018, ni sukcesis konstrui 3 putojn , mi petas al la Franca Asocio Solidareco Afrika-Azio daurigi la subtenon por putoj en la periodo de la jaro 2019, ĉar mi jam ricevis multe da petoj de diversaj vilaĝoj kaj lernejoj kiujn bezonas akvon.

Agrikulturo (sunfloro) projekto;

Bone progresas la sunflora projekto de Mazingira. Ni kolektis sufiĉe multe da sunfloraj semoj kiujn ni premis por ricevi sunflor-oleon kiun ni forvendis kaj gajnis jam ĉirkaŭ 15.000.000 Tz ŝilingoj, parto de tio mono ni jam elspezis por renovigi la instruistaj loĝejoj kaj la malsanulejo de Marambeka vilaĝo, alian parton ni elspezos por aĉeti la litoj kaj pordoj de la knabina internulejo ĉe Esperanto mez-lernejo, kaj se restos pli da mono ni elspezos por subteni-renovigi aŭ konstruadon de klas-ĉambroj

Sano Projekto:

Mi dankas al S-ro Manolo Parra de de Madrido kiun mondonacis por subteni la konstruado de loĝejo por kuracisto de Marambeka vilaĝo kaj S-ino Zilpa Hermes el Nederlando kaj S-ro Martin Markerian el Francio kiun mon-donacis por aĉeti mikroskopojn kiujn ni transdonis al la malsanulejoj de Kurusanga kaj Hunyari vilaĝojn, ankoraŭ mankas ĉirkaŭ 3500 Euroj por la tegmento, fenestroj kaj pordoj de la malsanulejo de Tiring'ati vilaĝo kiun la kaj ĉirkaŭ 6000 Euroj por litoj por la Malsanulejo de Hunyari vilaĝo.

Operacio de infanoj kun svelaĵo kaj misformiĝo;

Koran dankon al S-ino Christiane Lamy kaj S-ro Martin Markarian, kiuj mon-donacis por subteni la operaciojn de infanoj kun misformitaj piedoj kaj svelaĵoj dum tio periodo, ankoraŭ restas kelkaj infanoj kun piedoj misformitaj.

Mikrokreditoj projekto;

Dank' al tiu projekto, multaj vere profitis/as pruntepreni monon por starigi kaj daŭrigi siajn projektojn pri agrokultivado kaj bredado da kokinoj kaj aliaj bestoj ktp.

Arbariĝo;

Pro bona vetero dum tiu periodo, bone kreskis la arboj kiujn mi jam plantis, kaj mi esperas pli planti arbidojn sur la monto Tiring'ati kaj utiligi arbojn por abel-bredado kaj se eblos frukt-arbojn.

Radio projekto;

Radio "Mazingira Fm" daŭre elsendas la programojn por la tuta regiono sen problemo. *(tuta teksto redaktita de Manfred Westermayer, kiu enmetis mencion de WKV AG)*

Fino
Mramba Simba Nyamkinda